

INVITO AL KUNVENO DE LA AMSTERDAMA RONDO

*je dimanĉo, la **15a** de **septembro**, en Hotel De Koopermoolen
Komenciĝo je la **13a** horo. Fino ĉirkaŭ la 15a horo*

kunvenoj de esperan.stoj - ĉiun duan dimanĉon en la monato

Kunvenejo: Hotel De Koopermoolen, Warmoesstraat 3 – 5, 1012 HT Amsterdam.

Organizanto: laamsterdamarondo@gmail.com.

020-6946 073 (Peter) aŭ 023 5242 643 (Bert)

PRI TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Ni ĝojas ke **Clément Baleyte** venos al ni por prezenti TEJO-n kaj por paroli pri sia laboro kiel volontulo por TEJO en Roterdamo. Li origine venas el Bordoza, Francio, kaj diplomiĝis pri arta historio kaj arĥeologio. Li ankaŭ laboris en la kampo de kultura turismo. Kiuj estas la nuntempaj plej gravaj taskoj de TEJO kaj kiamaniere ĝi provas realigi tiujn? Kaj kion do faras volontulo de TEJO kaj kiaj estas liaj spertoj?

OVER DE WERELD ESPERANTO-JONGERENORGANISATIE

Wij zijn verheugd dat **Clément Baleyte** naar ons toe komt om wat te vertellen over TEJO en zijn werk als vrijwilliger voor TEJO in Rotterdam. Hij komt oorspronkelijk uit Bordeaux , Frankrijk, en is gediplomeerd in kunstgeschiedenis en archeologie. Hij heeft ook werk gedaan op het gebied van cultureel toerisme. Welke zijn de belangrijkste taken van TEJO vandaag de dag en hoe probeert TEJO die te verwezenlijken? En wat doet een vrijwilliger van TEJO zoal en hoe zijn zijn ervaringen?

PRI 'ZAMENHOF-PROJEKTO'

Je la 5a kaj 8a de septembro okazos speciala prezento de 'Zamenhof-projekto' Htolita „Breaking the Codes“, kiun kreis Jerzy Bielski. Vi povas legi pri Ĥu tre interesa projekto en la aldonoj. Aliĝu al la busvojaĝo al eksa Moresneto aŭ partoprenu la prezenton en Utreĥto. Unika ŝanco!

La LAR-kunveno de la 8a de septembro estas forŝovita al la 15a de septembro.

OVER HET 'ZAMENHOF-PROJECT'

Op 5 en 8 september vindt een bijzondere voorstelling plaats van het project over Zamenhof

“Breaking the Codes”, dat Jerzy Bielski hee] geproduceerd. U kunt over dit heel interessante project lezen in de bijlagen. Geef je op voor de busreis naar het vroegere Moresnet of ga naar de voorstelling in Utrecht. Een unieke kans!

De bijeenkomst van de Amsterdama Rondo van 8 september is verschoven naar 15 september.

Por la 5a de sept. , prezento en Utrecht vidu:

<https://gaudeamus.nl/events/jerzy-bielski-zamenhof-project-breaking-the-codes/>

Por la 8a de sept., vojaĝo al Moresnet (el Utrecht, Maastricht):

<https://gaudeamus.nl/events/esperanto-tour-zamenhof-project/>

Informteksto pri la Projekto 'Breaking the Codes'

Zamenhof Project: Breaking The Codes de juna muzikteatra aŭtoro Jerzy Bielski estas interdisciplina projekto inspirita de la ideoj kaj la vivo de Ludoviko

Zamenhof, la kreinto de la universala lingvo Esperanto kaj akcelanto de la monda paco. En ĉi tiu larĝskala interdisciplina projekto Bielski konstruas mondon, kiu surprizas, provokas kaj konfuzas.

Zamenhof Project: Breaking The Codes troviĝas ie inter koncerto, vizito en galerio kaj teatra aŭ danca spektaklo. La internacia trupo, konsistanta el aktoroj, muzikistoj kaj dancistoj, kiu inter si parolas sep lingvojn, engaĝas la aŭskultantaron en esploradon de komunikado (aŭ miskomunikado) kaj lingvo. La aŭskultantoj ne restos sidantaj la tutan tempon, sed rajtos libere malkovri la spacon kaj instalaĵojn kune kun la artistoj. Aldone al la premiero ĵaŭdon la 5-an de septembro en Het Huis Utrecht, la spektaklo prezentiĝos ankaŭ dimanĉon la 8-an de septembro en Kelmis, aŭ Neŭtrala Moresneto, kiel ĝi iam nomiĝis. La urbeto estis parto de eta neŭtrala lando, enpuŝita inter la landlimojn de Prusio, Nederlando kaj Belgio, kaj ĝi estis la sola loko en la mondo, kie Esperanto estis parolata kiel la oficiala lingvo.

Naskita en Pollando Bielski estas artisto-rezidanto ĉe Gaudeamus de 2017. Kiel juna teatraĵo-aŭtoro tie li ricevis spacon por disvolvi siajn esprimivajn muzik-teatrajn verkojn. Zamenhof Project: Breaking The Codes estas kunlaboraĵo de Stichting Futurists kaj Gaudeamus. La prezento estas parto de la festado de 100 Jahre Ostbelgien.

Gaudeamus, Meakusma kaj IntroIn Situ organizos ĉioninkluzivajn busajn veturojn

al Kelmis el Utreĥto, Matriĥto kaj Eupen (Belgio). Dumvoje vi ekscios ĉion pri Esperanto kaj la fascina historio de Moresneto, kaj vi povos partopreni kurson de Esperanto por komencantoj. Kiam ni atingos Kelmis, okazos organizita vizitado de la muzeo en Vielle Montagne, kie vi enprofundiĝos en la unikan pasintecon de Moresneto kaj en la mondon de Esperanto kaj zinko, kaj sekve vi ekskursos tra la vilaĝo. Je 16h30 la interdisciplina projekto de Jerzy Bielski estos prezentata en Kulturzentrum Select, akompanata de interagaj instalaĵoj. Post ĉi tiuj riĉigaj spertoj en Kelmis okazos vespermanĝo, antaŭ la revena veturo al Utreĥto, Matriĥto kaj Eupen.

La spektaklo estas destinita por publiko almenaŭ 18-jaraĝa.

Dum la spektaklo oni uzos stroboskopajn lumojn, laŭtan muzikon kaj fivortojn.

Zamenhof Project - Info text in Esperanto

Zamenhof Project: Breaking the Codes de juna muzikteatra aŭtoro Jerzy Bielski (gajninto de Ora Premio en Amsterdam Fringe en 2015 por "not only FUTURISTS") estas interdisciplina projekto projekto inspirita de la ideoj kaj la vivo

de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la universala lingvo Esperanto kaj akcelanto de la monda paco. En ĉi tiu larĝskala interdisciplina projekto Bielski konstruas mondon, kiu surprizas, provokas kaj konfuzas.

“Okazis, ke mi devenas de la sama urbo (Bjalistoko en orienta Pollando), kio por mi prezentas la idealojn kaj la tutvivan laboradon de Ludoviko Zamenhof en tute malsama, pli persona perspektivo. Aldone, la sama urbo estas la nesto de la rapide kreskanta nun pola novfaŝismo”, diras Bielski. Komunikado inter homoj, kiuj devenas el diversaj kulturoj, fonoj, sociaj klasoj, ĝenroj ktp. estas la kerno de la verko. Problemoj, kiujn ĝi naskas, kondukantaj al miskomprenoj, malamikeco kaj konfliktoj, prezentas la alian flankon de tio. Lingvo, ĉu parolata, skribata aŭ baziĝanta sur gestoj, kune kun nevortaj kodoj kaj la maniero laŭ kiu ni uzas ilin, estas ne nur tio, kio nin ligas, sed ankaŭ ekzakte tio, kio dividas nin unu de la alia. Tial ĝi povas doni la plej efikan manieron por manipuli la aliajn... Konstruado, detruado, kreado, dekonstruado de FORMO de ajna komunika sistemo kuŝas en la centro de ĉi tiu verko.

Dum ĉi tiu 1,5-hora interdisciplina eksperimento/evento vi povos sperti tute ŝokan miksaĵon de muziko kaj teksto originale verkita por ĉi tiu artaĵo, nedisigeble kunplektitan kun koreografio skrupule kreita por 11 artistoj, kelkaj ŝokaj soninstalaĵoj, kune kun speciale por ĉi tiu prezento konstruita scenografio kaj

kudritaj kostumoj, videaĵoj, unikaj sonregistraĵoj kaj nunludata muziko – ĉio ĉi funkcios kune kaj en multaj fragmentoj. Vi aŭdos la nederlandan, la anglan, Esperanton, la polan, la francan, la danan, la rusan, morsan alfabeton, brajlon, binaran kodon, DNA-kodon – ĉio ĉi estos implikita en sovaĝan kolaĝon de ritmaj aranĝoj, kiuj malkovros la muzikajn strukturojn, ritmojn, intonaciojn, fonemojn kaj la unikajn sonajn elementojn de ĉiuj ĉi lingvoj kaj sistemoj.

Prezentas ĝin internacia grupo de aktoroj, dancistoj, muzikistoj, video- kaj sonartistoj, kune kun du

muzikinstrumentistoj de la nova dana muzika ensemblo K[h]AOS (Asko|Schönberg).

----- Daŭro: 1h 30 min.

Dum la spektaklo oni uzos stroboskopajn lumojn, laŭtan muzikon kaj fivortojn. La spektaklo estas destinita por publiko almenaŭ 18-jaraĝa.

NOTOJ

Jerzy Bielski, Ludwik Zamenhof, William Burroughs, Ludwig Wittgenstein

Krea teamo:

Jerzy Bielski – ideo, muziko, teksto, movado, sono, video, scenografio, artista estro

Sandra Abouav (Francio) – koreografio

Laura Jakschas (Germanio) / Frances Sanders – didaskalioj

Karolina Maksimowicz (Pollando) – kostumoj, scenografio, soninstalaĵoj

Felix de Bousies (Belgio/Grekio) – video, soninstalaĵoj

Interpretistoj:

Akim Moiseenkov (Nederlando) – kantisto/muzikilo-konstruisto/muzikisto

Claire Malchrowicz (Francio) – kantisto/dancisto

Eva Layla Schipper (Nederlando) – kantisto/aktoro

Pawel Chomczyk (Pollando) – kantisto/aktoro

Kirstine Lindemann (Danio) – kantisto/muzikisto

Richard Dubelski (Francio) – kantisto/muzikisto

Felix de Bousies (Belgio/Grekio) – interpretisto

Tatiana Rosa (Nederlando) – nunludataj elektronikaĵoj, sono, sona kaj videa programado

Tim Sabel – preparita piano, elektronika MIDI-piano [Asko|Schönberg – K[h]AOS]

Noè Rodrigo Grisbert – drumo [Asko|Schönberg – K[h]AOS]

Tekstoj de:

Jerzy Bielski – gitaroj

Asistanto ĉe realigado: Matthijs Mantel

Partneroj kaj kunrealigantoj:

Fondaĵo Gaudeamus, Asko|Schönberg, Fonds Podiumkunsten, Grachtenfestival Amsterdam, Muziekgebouw aan 't IJ, Intro In Situ, Varsovia Aŭtuna Festivalo (Pollando), Meakusma Festival, Instituto Adam Mickiewicz, Muziekhuis Utrecht, Teatra Instituto (Pollando), Amsterdamse Bostheater, Universala Esperanto-Asocio, Esperanto Nederland (Roterdamo), Academie voor Theater en Dans (Amsterdamo), Grupa Coincidentia, Bjalistoka Esperanto-Societo, Przetwórnia Meblowa Białystok

Jerzy Bielski estas nun rezidanta artisto ĉe Fondaĵo Gaudeamus kaj ricevinto de

la stipendio "New Maker" de Fonds Podiumkunsten, kies parto estas la realigado de ĉi tiu projekto.

Grafika fasonado: Michał Matoszko